[Ja]ro III/VII. 5 N-o (29) Februaro 1926

Sennacieca Revuo

Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
Fondita en 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

ENHAVO:

K. Fade: Ĉu SAT-anece. — *A. Isahakjan:* Abu Lala Mahario. Trad. *Gurgeno Sevak.* — *L. Ivn:* Profesoro Krajon. — *A Lunaĉarski:* Kiel naskiĝis la arto. Trad. *V. K.* — *P. Blonski*: Edukado kaj pedagogio en burĝa kaj proletaria socio. Trad. *Vol. Duno.*

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Jam kelkaj kamaradoj tuŝis la temon pri plivigligo de nia revuo, pri entiro de pli vastaj SAT-rondoj en la laboron super la revuo. Tion ja dekomence ni celas, sekve povas temi nur pri la vojoj por atingi tiun celon.

Por ke nia revuo, restante literatur-scienca, estu SAT-eca, ne sufiĉas kompreneble nur nomi ĝin "Sennacieca". Necesas ke ĝi estu ligita kun la vivo de nia organizaĵo. Antaŭ kvin jaroj, kiam SAT estis nur fondiĝanta, certe neniu povis postuli ke ĝi tuj havu literaturan presorganon, respegulantan en siaj literaturaĵoj la vivon de l' juna organizaĵo. Sed nun, kiam ni havas inter ni ne nur izolajn SAT-anojn, sufiĉe laborintajn por kaj en SAT, sed ankaŭ vigle funkciantajn SAT-grupojn, ni jam maturas por tiu ĉi postulo. Nia literatur-scienca revuo devas ne nur kolekti perlerojn de homara literaturo, ĝi devas jam per literaturaj laboraĵoj de SAT-anoj mem tuŝi la aktualajn problemojn de nia SAT-vivo.

Ĉu vere jam estas natura por tio nia kolektivo? Ŝajnas al ni ke jes. Jes, ĉar venas jam sur la redaktan tablon la rakontoj, kiel la enpresata hodiaŭ "Ĝu SAT-anece?" Ĝi estas la unua signo, ke ni jam kapablas, eble nesperte ankoraŭ, enmeti en viglan, pli akre tuŝantan la penson, literaturan formon apartajn problemojn de nia laboro.

K-do Fade akompanis sian rakonton per jenaj postnotaj linioj:

"Ĉi rakonto estis verkita sub influo de la artikolo "Inter ni" en n-o 7 (59) de Sennaciulo (Temo: Kiu unue: ĉu SAT-ano, ĉu partiano)."

Sendube, por ĉiuj devas esti klare, ke en la rakonto estas speciale aludantaj *nek* iuj difinitaj partioj, *nek* iuj difinitaj landoj kaj urboj, *nek* iuj difinitaj personoj kaj okazoj. Ĉiuj okazintaĵoj priskribitaj en la rakonto estas plene elpensitaj. Verkante tiun ĉi rakonton, mi nur celis ilustri la artikolon "Inter ni", en n-o 7 (59) de Sennaciulo, per la okazoj tute elpensitaj de mi, sed tute eblaj en iu ajn loko kie regas troa partia sentolereco.

Konklude mi esprimas la deziron, ke tiu ĉi rakonto estu pridiskutota sur la paĝoj de Sennaciulo aŭ de SR." — La aŭtoro. 21. 1. 26.

Daŭrigon vidu sur 3a paĝo de la kovrilo.



"Ĉu SAT-anece"?

K. FADE

I

Mia animo nun estas tre maltrankvila. Profunda doloro ĝenas min. Mi sentas, ke mi devas rakonti ĉion al la SAT-anaro. Estas malfacile rakonti la tutan mian tragedion. Tamen mi provos fari tion.

Antaŭ ĉio mi prezentu min: Mi estas seruristo, sufiĉe nova SAT-ano, sed tre malnova kaj sperta partiano. Antaŭ nelonge oni min elektis eĉ en la parlamenton, kie mi reprezentas mian partion.

La afero okazis jene: antaŭ unu monato mi ricevis leteron el lando premita de la blanka teroro. La letero estis de unu SAT-ano tiulanda — k-do X., kaj enhavis plorpeton helpi lian vojaĝon en mian landon el lia, kiun li forlasas pro la terura senlaboreco.

Mi, ankoraŭ nova SAT-ano, tre ekĝojis pri la okazo helpi alilandan kunfraton, kaj uzi SAT-servon. Mi respondis al li jese kaj komencis klopodi.

Fine, post du semajnoj mi staris sur la stacidoma perono, atentante la vagonaron. Jen ĝi venis... Senpacience mi komencis serĉi k-don X., neniun mi renkontis... Fine, en la lasta vagono min haltigis iu, tre modeste vestita, junulo kun briletantaj grandaj okuloj, kaj demandis min: ĉu mi estas k-do F.? Mi jesis. Li rekomendis sin, kiel k-do X., kaj ni ĝojege manpremis unu la alian. Li ekplaĉegis al mi.

Mi kunprenis lian korbeton kun liaj objektoj, kaj akompanis lin al mia hejmo, kie prezentis al li angulon kun lito en mia ĉambreto. Mi donis al li manĝi, kaj poste helpis lin malpaki lian korbeton kaj revestiĝi. Estas kompreneble, ke la tutan tempon mi babilis kun li.

Mi ekscitite demandis lin pri la laborista vivo kaj pri la blanka teroro lialanda. Li, mallevinte la kapon, mallaŭte, trankvile respondis al mi, priskribante la mizeron de la laboristoj kaj la teroron. Mi atentege aŭskultis lin; tradukante liajn plej karakterizajn frazojn al

mia familio. La filineto, malferminte la buŝeton, kun miro rigardis la k-don. La edzino ankaŭ kliniĝinte, kompateme rigardis lin.

Dume ni malpakis la korbeton, kaj sur ĝia fundo, sub la drapo ĝin kovranta, mi trovis kaŝitan SAT-matrikulon, en kiu estis notita tute ne li, sed iu alia k-do Z. Tiu k-do Z. estis famigita en ĉiuj gazetoj, kiel mortiginto de la sangavida policestro s-ro R.

Mi kun miro ekrigardis k-don Z.

Li, paliĝinte, kun ekbriletintaj okuloj kaj ektreminta voĉo, tamen trankvile kaj firmavoĉe diris al mi:

— K-do, Kaŝu! Absolute neniu devas scii tion...

— Ĉu vi estas k-do Z.?

— Jes!..

Mi eksilentis. La k-do, ankoraŭ pli trankvile kaj serioze, daŭrigis:

— Mi mortigis tiun policiston... Mi ne povis elteni, kaj mi estis devigita ŝanĝi la nomon, kaj elmigri kvazaŭ pro senlaboreco, ĉar ili ĉasis min... (Li iomete malpacienciĝis). Nu do, kaŝu, k-do! Kaj al neniu diru...

Mi, forskuinte la "ombron" de mia animo, redonis al li la bileton (kiun li denove kaŝis), kaj ekparolis pri alia temo...

II

Mi komencis serĉi insiste por k-do X. laboron ĉe iu presejo (li estis kompostisto). Sed tiu serĉado prosperis malbone, ĉar en mia urbo estas malmultaj presejoj kaj regas granda senlaboreco.

Dume mi konatigis lin kun tri aliaj SAT-anoj estantaj en mia urbo. Kaj ni: ĉiuj SAT-anoj, mia familio kaj k-do X. preskaŭ ĉiuvespere kolektiĝadis ĉe mia tablo, kaj ni daŭre babiladis. Tio estis la plej belaj vesperoj de mia vivo. Atentege ni aŭskultis lian trankvilan, sed ĉiam flamigan parolon. Ni parolis pri organizo de la internacia klasbatalo pli larĝskala, ni revis pri la epoko, kiam estos neniigita la kapitalismo, kaj projektis nepran organizon de la kunligo de niaj laboristoj, kun la alilandaj, por eduki ilin sennaciece... Ni projektis multon!...

Dum nia "projektado", li ĉiam kliniĝinte, silente, feliĉe ridetis, kaj liaj grandegaj nigraj okuloj briletis kvazaŭ steloj.

Ni ĉiuj, kaj aparte mia filineto, kun kiu li multe ludis, dum ĉitagoj treege ekamis k-don X., tiun junulon, nealtan, nigrharan kaj palan, infane-simplan kaj modestan.

Unuvespere, antaŭ la urba partikunveno ni decidis helpi lian elpaŝon ĉe tiu kunveno, t. e. servi kiel tradukistoj. Bedaŭrinde, mi ne povis ĉeesti la partikunvenon, kaj la tradukado estis komisiita al alia SAT-ano, k-do B., ankaŭ partiano.

Mi kun bedaŭro disiĝis kun nia rondo kaj foriris la laboron, kie mia ĉeesto estis nepre necesa. Mi revenis hejmen nokte, malfrue.

III

La sekvintan tagon, frumatene, kiam mi apenaŭ sukcesis vesti min, sed k-do X. ankoraŭ dormis, subite venis leterportisto, kaj transdonis al mi leteron, enhavintan la ordonon nepre, tuj veni al la partia komitato.

Mi, maltrankviligita kaj mirigita, malmulte manĝinte rapide ekiris la partian komitaton. Veninte tien, mi kun hezito eniris la ĉambron de la sekretario. Tiu fremdece ekrigardis min, kaj diris malvarmtone:

— Sidiĝu, k-do... Jen! La partia komitato havas al vi la demandon: kiun vi enloĝigis ĉe vi?

— K-don X., elmigrinton el blanka lando.

— Kiu li estas?

— Laboristo-presisto... Nun li estas senlabora.

— Sed laŭ partieco?

— Mi, ne scias... Mi ne demandis lin.

— Kial do vi ne demandis? Vane vi ne faris tion.

— Sed li ja estas laboristo!..

— Tute egale! Do, observu la rezultojn! Kaj li transdonis al mi freŝan numeron de iu burĝa ĵurnalaĉo, nelegitan ankoraŭ de mi, kaj montris kelkajn liniojn, substrekitajn per blua krajono. Mi tralegis:

“Hieraŭ ĉe la partikunveno en la Rob. salono okazis granda skandalo. Post la raporto de s.ro H., elpaŝis iu elmigrinto nomita X. kun esp.-lingva salutparolo, tradukita de s.ro B. En sia parolo tiu X., salutinte la lokan laboristaron, priskribis la blankan teroron lialandan, ekscitige pledis por la ribelo, kaj aludis, ke niaurba partiorganizaĵo malbone helpas al la eksterlanda laboristaro. Post tio okazis akra diskuto. Kontraŭ X. elpaŝis 3 personoj, inter kiuj estis reprezentanto de la partikomitato. Sed 2 sekvintaj oratoroj defendis lin, per pruvoj, ke la afero de la “internacia solidareco“ efektive ĉe ni malbone prosperas. Reprezentanto de la polico proklamis, ke tiu X. tre similas unu konatan krimulon, kaj arestis lin. La publiko defendante lin, atakis la policon kaj elŝiris lin el manoj de la policisto. Okazis interpuŝiĝo, dum kiu X. malaperis. Estas unu vundito.

Estas sciigoj, ke tiu X. loĝas ĉe s.ro F. — parlamenta deputito.“

Mi finis la legadon. Ĉio intermiksiĝis en mia cerbo. Mi povis nenion kompreni klare. Mi silentis.

— Nu? — demandis la sekretario de la partia komitato.

Mi silentis. Li daŭrigis:

— Sekve vi vidas, ke oni devas ĉiam pli singardeme enloĝigi en sian hejmon... Kiu li estas? “Suspektinda persono!..“

— Ne!.. — fine mi elparolis — li ne povas esti krimulo!..

— Tute egale! Li enportis skismon en nian organizaĵon, li malhonorigis ĝin. Do bonvolu jam hodiaŭ elloĝigi lin el via hejmo.

— ...Sed kiel mi povas?!..

— Tio estas ne mia zorgo. Vi estas nia reprezentanto ĉe la parlamento, kaj vi ne devas vin ĉirkaŭigi per "surspektintaj personoj", ĉar tio malbone influos la aŭtoritaton de nia partio, kiun vi reprezentas. Do...

— Ĝis la revido! — diris mi, kompreninte, ke nur la samon mi aŭdos de la sekretario, kaj mi eliris el la ĉambro.

Dolorita ekscito bolis en mia animo.

IV

Mi iris nek laborejon, nek mian hejmon. Mi vagis tra la urbo, kaj multegaj pensoj zumis, kaj interbatalis en mia cerbo. Mi nenion atentis sur la strato, nek sunradiadon, nek ludantajn infanojn, nek policistojn sur la stratkruciĝoj. Nur la cerbon boris la penso:

"Kion fari? Kion fari?"

"Ĉu forpeli lin el mia hejmo? Sed kial? Ĉu li estas iu vere "Suspektinda persono"? Ne!.. Ĉu li estas laboristo, SAT-ano, revoluciulo? Jes!.."

"Sed kiel tamen burokratiĝis la sekretario de nia parti-komitato! Vere!... Kia diabla moka esprimo estis sur lia vizaĝo! Suspektinda persono!.."

"Sed kiel mi povos lin elloĝigi?"

Kaj mia cerbo rifuzis funkcii. Mi nur prezentis al mi la grandegajn, brilajn, sed trankvilajn okulojn de k-do X.

Mi preteriris nian partikunvenejon, en kiu senteble bolis la laborista amaso, kaj al mi venis la aliaj pensoj:

"...Ne gravas ecoj de la sekretario partikomitata. Sed kion kaŭzas mi al la tuta partio?.. Kiu mi estas? Mi estas parlamenta deputito... Mi devas esti singarda, ĉar mi ja efektive reprezentas la amason... Mi ne devas doni eĉ la etajn pretekstojn al la burĝaj ĵurnalaĉoj — ataki la partion. Mi devas min konduti senriproĉe... Vere diris la sekretario... Kvankam tro akre!..

"Kaj krome, kial nur mi devas elspezi por k-do X., kaj loĝigi lin... Ja ekzistas la aliaj SAT-anoj! Jen, ekzemple k.do L., senpartia laboristo, kun sufiĉa salajro... Li ja unufoje jam invitis k-don X., nur mi tiam kontraŭstaris tion!"

Mia konscio iomete klariĝis. Mi trovis difinitan decidon, kaj trovite ĝin, mi ekrapidis la uzinon, kie laboris k-do L., por interparoli kun li. Mi trankviliĝis...

Vespere, ni ĉiuj denove kolektiĝis ĉe mia tablo. Kiel ĉiam, k-do X. estis trankvila, kaj liaj okuloj briletis. Nur sur lia pala, junula frunto aperis nova sulko.

Mi malĝoje kaj konfuzite rigardis lin. Ankaŭ k.do B. tradukinta lian parolon kaj pro tio ankaŭ ricevinta riproĉon de la partikomitato.

Nur du aliaj laboristoj-SAT-anoj laŭkutime ekscitite babilis kun li pri la bezono kaj pri la formoj de la plia organizado de Reciproka Helpo Laborista.

Fine, kiel estis interkonsentite, k-do L. invitis k-don X. transloĝiĝi en lian hejmon. Mi subtenis lin, dirinte, ke ĉe k-do L. estas pli oportuna loĝejo, kaj oni povas pli trankvili rilate al spionado.

La grandaj, infane klaraj okuloj de k-do X. mirigite rigardis min. Ankoraŭ nova sulko aperis sur lia pala frunto. Tamen li trankvile konsentis. Nur mia filineto arde, kun ploro, protestis kontraŭ lia elloĝigo. Ŝi krietis:

Mi ne forlasos vin! .. Oni vin denove arestos! ..

Tamen la edzino, same mirigita, trankviligis la filineton, parolante, ke ni ĉiutage gastos ĉe li.

Kaj la saman tagon li transloĝiĝis.

V

La sekvantan tagon, vespere, kiam mi hejme ripozis lacigita, subite mi ekaŭdis la ekkriojn de gazetvendistoj, kurantaj surstrate:

— "Vesperĵurnalo!" "Vesperĵurnalo", "Novaĵo!" "Mortiginto de policestro R. estas arestita en nia urbo! .." "Novaĵo! .."

Mi saltis kvazaŭ elektrizita, elkuris surstraten kaj aĉetis la ĵurnalon. Momente mi malfaldis ĝin kaj sur la dua paĝo tralegis:

"La mortiginto de policestro R. estas arestita"

"Parlamenta deputito F. kaŝis la krimulon"

"Hodiaŭ matene en nia urbo en la loĝejo de laboristo L., estis arestita la mortiginto de policestro R. (La mortigo okazis antaŭ 2 monatoj en nia najbara lando.) Tio estas iu Z... Li kaŝis sin sub nomo X., kvazaŭ elmigrinta pro la senlaboreco, kaj loĝis ĝis la lasta tago ĉe s-ro F. — parlamenta deputito. La sekreta polico jam delonge trovis liajn postesignojn, sed la kapto de la krimulo estis malfaciligita per la fakto, ke la suspektata persono loĝis ĉe la parlamenta deputito. Hieraŭ X. elloĝiĝis de s.ro F. kaj tio ebligis lian definitivan malkaŝon, kaj lian senbaran areston."

Ĉiuj fortoj forlasis min. Min apenaŭ sukcesis min apogi je dommuro. La strato freneze ekdancis antaŭ mi. Mi nur klare prezentis al mi trankvilan, palan, modestan vizaĝon de k-do Z. Mi ekvidis liajn grandegajn, brilajn okulojn, kiuj kun riproĉo k. miro rigardis min.

Mi perdis ĉian estimon al mi mem. Jes! ... Oni malnoble trompis min, *kaj mi fidis!* ...

En mia cerbo zumis la krio:

— "Kion mi faris!? Kion mi faris!?"

Nun, konfesinte ĉion, mi prezentas min al juĝo de la tuta ge-SAT-anaro tutmonda!

ABU LALA MAHARIO

ARABA POEMO

A. ISAHAKJAN

Avetik Isahakjan estas unu el la eminentaj modernaj poetoj-verkistoj de Armenio. Li famiĝis precipe pro la poemo "Abu Lala Mahari", kies enhavo estas prenita el antikva araba buŝlegendo pri Abu Lala Mahari. La poemo konsistas el KASIT (prologo) kaj sep SURAH'oj (ĉapitroj). Ĝi estas tradukita en multajn eŭropajn lingvojn, inter ili la rusan tradukon faris la fama poeto V. Brjusov (vidu S. R. n-o 3/15). La poemo aperos ĉapitron post ĉapitro en nia revuo.

KASIT

Abu Lala Mahari',
La fama poeto el Bagdad',
Tri jardekojn en la riĉa kalif-urbo
Trapasigis en feliĉ' kaj ĝuo;
Kun altranguloj kaj kun riĉuloj ofte li tagmanĝis,
Kun scienculoj kaj kun saĝuloj ofte disputadis.
Amadis, provadis daŭre la amikojn,
Vizitadis multajn diversajn naciojn,
Esploradis ĉie li la nomojn kaj leĝojn . . .
Kaj lia animo, profundenpenetra,
La homojn ekkonis finfine, sed plene,
Kaj ekmalamegis li la homojn, leĝojn!
Kaj, — ĉar nek edzinon, nek infanojn havis —
La tutan riĉecon li almozdisdonis,
Kaj dum unu nokto, dum dormis Bagdado
Sur la cipresriĉaj bordoj de l' rivero Tigro,
El la urb' forkuris li kun karavano.

UNUA SURAH

Kaj la karavano de Abu Lala'o, kun agrabla muĝo de l' rideta font',
Marŝis malrapide, en la akompano de l' kamelsoniloj tra l' dormanta nokt'.
Per egalaj paŝoj, laŭ serpenta iro volve antaŭglitis la gekamelar';
Tra la vastaj kampoj disfluetis dolĉe la agrabla trilo de la sonilar'.
En volupta ĝuo dronis urb' Bagdado sub brilegaj luksaj songoj pri Ĝennath' [1]

[1]) *Ĝennath* – araba vorto, signifanta: paradizo.

En ĝardeno ĉarme trilis najtingaloj himnojn de la Amo, larme, kun korbat'.
Per diamantbrilo daŭre petolridis luksaj fontanegoj en palaca kort';
Kiso kaj aromo en la ĉirkaŭaĵo flirtis en abundo kun respondakord'.
Kaj la karavano fluis laŭ zigzagoj kaj al ĝi entute mankis postrigard';
Logis la poeton kun senfinaj ĉarmoj la netrairebla, longa vojirad'.
– Iru, ĉiam iru, mia karavano, iru senrevene kaj ne haltu vi!"
Tiel ekparolis mem al sia koro la poeto granda Abu Mahari'.
– Marŝu al senhomaj virtaj malproksimoj, al smeraldaj landoj, el Bagdado for!
Al la sun' rapidu, por ke mia koro povu forbruliĝi ĉe la suna kor'.
Kaj al vi nun eĉ "adiaŭ" mi ne diras, mia patro lando, mia lulkantad',
Mia kor' kun vi malpaca restos ĉiam, ho gepatra domo, ho knabeca land'!
Amis mi ja multe miajn kamaradojn, kaj la homon ĉie amis mi ĝis nun,
Sed vipur' fariĝis ĉiam tiu amo kaj ekpikis koron mian kun venen'.
Mi malamas, kion iam mi adoris, kiel la homaĉon kun la fi-anim':
Ja mil malnoblaĵojn mi sukcesis vidi en la homa virto, kun ekabomen'
Sed evitas mi ilian kronon pleje, kiu en la mond' nomiĝas nur hipokritec'!
Ĝi ja malvirtulon igas sankta viro kaj kanajlon kronas per naivsanktec'!
Do, parolu, homa, vi belĉarma lingvo, vi kiu vualas per ĉiellazur'
La spiritgehenon kriman de la homo, ĉu en vi ekzistas vera paroler'?
Vi lingvaĉo homa, vi venena sago, pikis mian koron, vi — ŝajna miel',
Kaj en mi ekmortis la ĉiel' da amo, suno radianta, kredo kaj esper'.
Iru al dezerto, mia karavano, al dezert' senhoma, brula pro la varm'!
Por rifuĝo haltu ĉe sovaĝobestoj sub la kupriĝinta arda ŝtonegar'.
Mi alfiksu tendon mian ĉe l' serpentoj, tie ja miloble pli da garanti',
Pli da pac' mi trovos, ol ĉe la amikoj. Mi prefere gastos ĉe l' serpent-skorbi',
Ol amikon fidos, metos mian kapon por momentripozo lia sur brustaĉ',
Ja, l' amika brusto majstre vualigas per karesaj vortoj fundon de l' perfid'.
Dum ĉielloĝanta suno helradia rostigadas altan pinton de Sina',
Dum la flavaj sabloj ludas en dezerto, kiel la ondetoj plaŭdaj de la mar', —
– Mi ne plu ekvolos vidi iam homon, min ne devas trovi viro aŭ virin',
Ne deziras aŭdi mi pri homaj agoj, penso pri la homo abomenas min!..."
Kaj la lastan fojon Abu Mahari'o dorsen ekrigardis al dormanta urb',
Kaj kun abomeno li sin tuj ekturnis kaj ekklinis kapon sian al la ter',
Ekkaresis varme la kamelon rajdan, kisis okulegojn ĝiajn kun ameg'
Kaj tuj elpendiĝis sur okuloj liaj, haŭton bruligonte, po unu larmer'.
Kun agrabla muĝo, takte balancante volviradis daŭre la gekamelar';
Marŝis ĝi dezerten, al terenoj varmaj, al malproksimegaj landoj, ĉiam for...

El armena lingvo tradukis *Gurgeno Sevak.*

PROFESORO KRAJON

L. IVN

En somero de 1905 nia nelegala rondeto ĉe maŝinkonstrua uzino "I. Hen kaj Filo" ricevis sensacian komunikon: profesoro Krajon konsentis tralegi al ni kelkajn lekciojn pri historio de socialisma movado.

Ni kunvenis je difinita tempo ĉe unu kamarado kaj malpacience atendis la faman socialiston, kies terure eksplodivajn librojn oni povis trovi tiutempe ne nur en manoj de revoluciema laboristo, sed ankaŭ — sub matraco de scivolema nobelino.

Jes, profesoro Krajon estis la plej moda verkisto de tiu ribelplena epoko. Oni lin legis, laŭdis kaj aplaŭdis.

Pasis duonhoro, pasis unu horo: "la profesoro ankoraŭ ne venis. Kelkiuj jam proponis disiĝi. Sed forta kvazaŭ-mastra pordofrapo ilin retenis.

— Ŝajnas, mi iom malfruis?

— Jes, iomete.

Li eniris, ĉirkaŭrigardis la ĉambron, elpoŝigis sian horloĝon, esploris ĝin kaj metis sur la tablon, eltiris cigared-skatoleton, prenis cigaredon, ĝin ekbruligis, forĵetis malŝate alumeton, ekrigardis multsignife la cigaredon, ree ĝin enbuŝigis, eligis tra naztruoj kelkajn fumringojn, melankolie okulsekvis ilian suprenfugon (same forflugas la vivo de l' homo!) kaj malrapide diris:

— P...f...asintan fojon mi p...f...arolis pri ...

Per okulorbitoj larĝaj ni okulumis lin ne pli saĝe ol bovidoj, kiuj la unuan fojon ekkuraĝis rigardi tra malfermita korta pordego.

— Kvankam, ŝajnas, mi p...f...arolis al vi pri nenio, ĉar mi estis ĉe vi neniam.

Ni jesis.

— Do mi devas vin averti, ke so...ĉialiŝmo estas tre malfacila, nebuleca, eĉ nebuloza afero. Necesas plenstreĉi ĉiujn mensofortojn. Certe mi dubas, ke vi ion komprenos, tamen mi faros eksperimenton.

Li komencis analizi kapitalisman sociordon kaj ties kontraŭdirojn. Liaj paroloj turniĝis pli rapide ol pulioj en nia uzinfako. Ili glitis seninterrompe kvazaŭ rimenoj. Malgraŭ tio en niaj kapoj efektive regis nebulo. Tra densa polvo de "varo, produkto, plusprodukto, konsumvaloro, ŝanĝvaloro, supervaloro, simpla valoro, valoro, kosto kaj prezo" — ni vidis certe nenion.

Pli ĝuste ni vidis nur lin, kiu samtempe suprenlevis la brovojn kaj kuntiris, maltiris, entiris la lipojn, kiu klinis la kapon malantaŭen,

poste dekstren, poste maldekstren, kiu tremigis ondece la vangojn, malice duonfermis okulon kvazaŭ dirante: “mi ja bone scias, ke vi estas... tre saĝaj“, kaj rodante senkompate vortojn (ŝajnis: la tuta kapitalismo kun ties tripoj trafis lian avidan faŭkon), li ruze ridetis, ondmovis la manojn kaj ŝprucigis tra l' dentoj.

— Sed ne forges... su nian Soĉialiŝtan Internacion! Ĝi...

Lia voĉo fariĝis siblanta kaj misterplena. La maldekstra duonfermita okulo fulmis. La manoj uraganis. Tremis la kapo.

— Ĝi pli... pli valoras ol kilo da viena kolbaso. Ĝi estas... neordinara afero. Kaj ni, soĉialiŝtoj, havas tioman potencon ke nenies forto...

Kvin fingroj rapide pugniĝis, kaj li frapis la tablon tiel potence, ke ni apenaŭ sukcesis nin ĵeti al du lampoj, kiuj staris sur la tablo. Ili minacis aranĝi tutmondan incendion.

La incendio ne okazis. Sed tio povis ĉiuminute okazi, ĉar la estimata profesoro opiniis siajn manojn esti marteloj.

Li daŭrigis akcenti ĉiun silabon. Li maĉis kaj ĝuis ĉiun vorton kvazaŭ ĝi estis dolĉa konfitaĵo. Sur blanka kalka muro viglis du violaj siluetoj de lia staturo. Ili jen kreskis ĝis giganteco, jen malkreskis ĝis dimensioj de pulo.

La eminentuloj akvofale saltis el lia buŝego:

— Ĉu vi konas Kaŭtski? Lasal? Bernŝtejn? Akselrod? Ĉu vi scias, kion parolis Marks kaj Engels? Jen vi... respondu!

La profesoro sin turnis al unu kamarado, fiksis rigide liajn okulojn kaj atendis la respondon.

Estis paŭzo.

Ĉiuj silentis kaj frotis nukojn. Kion respondi? Kion do povis diri tiuj eminentuloj.

La profesora vizaĝo, kiu similis grandan (eble strutan?) ovon, fiere ĝojis: “mi ja avertis vin, ke soĉialiŝmo estas tre malfacila afero!“

Post duonminuta paŭzo la fiereca esprimo de lia vizaĝo estingiĝis. Ĝin sekvis grava mieno. Li elpoŝigis naztukon kaj purigis la nazon. Kiam la naztuko revenis sian lokon kaj ĉio estis en ordo, liaj vangoj subite ŝvelis kvazaŭ ovo kiun ĵus naskita kokido penas frakasi por saluti la tutmondon. Kaj la voĉo obtuza, elbarela dignoplene proklamis:

— La regantaj klasoj tremu antaŭ soĉialiŝta revolucio. Ni . . .

Longa paŭzo.

— Ni, proletoj, havas nenion en ĝi por perdi krom niaj ĉenoj.

Ree paŭzo. Li prenis sian horloĝon de l' tablo kaj balancis en l' aero ĝian oran masivan ĉenon.

— Sed ni havas mondon por gajni.

Li eksilentis por unu minuto, poste direktis al ni sian fingron, kiun li kelkfoje rondmovis (vera borilo!), kaj severe nin demandis:

— Ĉu tio klaras?

Neniu respondis. Tiam li daŭrigis:

— Sed ni, soĉialiŝtoj, decidis tion okazigi... firm... é... é!.. — li intence plilongigis la vorton kaj akcentis ne "i", sed "e".

— Do, kamaradoj, ni luktu!

La profesoro larĝe malfermis la buŝon, grincigis sian oran dentaron kaj komencis krii, poste — tondri, fine — profunde basi:

— Ni luktu, diablo prenu, kontraŭ tiu tiraneca reĝimo. Ni akiru ĝeneralan voĉdonadon. Kaj tiam... tiam ni aliigu la vivon. La ĝene — rala voĉ — don — ado! Jen nia nobla celo!

Li antaŭen puŝis sian korpon kvazaŭ akceptante nevideblajn ekbatojn al amboso de l'brusta amelita tolaĵo. Jes, li ni timas. Li pretas perei por tiu feliĉa estonto. Ĉu ion valoras li, profesoro Krajon, kompare kun "soĉialiŝmo?"

Regis deca silento. Ĉu necesas aplaŭdo, kiam oni oferas sian vivon tiel grandanime por tiom nobla celo?

Certe kelkiuj ne povis kaŝi siajn sentojn: ili obtuze ternis kaj gruntis, kiel porkidoj. Sed la plimulto mirigite silentis.

Profesoro Krajon rekonsciiĝis; zorgeme li kolektis sian havaĵon kaj sin direktis al la pordo.

— Mi devas tre rapidi. Mankas tempo. Nun mi kuras al grafino Teklo Zet. Ĉu vi konas ŝin? Hodiaŭ vespere en ŝia salono ankaŭ mi lekcios pri soĉialiŝmo. Certe vi komprenas, ke tre... tre gravas varbi influajn personojn por nia sankta afero. Ju pli multe, des pli bone. Ĉu ne?

Ni lin bone komprenis kaj pro tio rifuzis por ĉiam liajn lekciojn.

— Kuru li al... Teklo Zet por sia sankta afero kaj nobla celo. Tie li ĝenerale voĉdonadu. Sed li ne malfruu!

KIEL NASKIĜIS LA ARTO?

A. LUNAĈARSKI

En la larĝa senco de l' vorto oni nomas arto ĉian scipovon. Oni povas esti arta diplomato, arta ŝuisto. Germanoj kaj francoj por signi la arton, en la propra senco de l' vorto, diras: "bel-artoj". Oni kalkulas ordinare el ili kvar: muzikon, pentradon, skulpturon kaj arkitekturon. Sed tiu divido ne estas tute preciza, ĉar unu el la plej grandaj artoj estas la poezio, ankaŭ oni neniel povas forgesi tiajn artojn, kiaj — la teatra kaj danca. Sed per tio ne elĉerpiĝas ilia nombro: tre interesaj artoj estas tiuj ankaŭ, kiel la juvela, keramika, mebla . . .

Haltu, haltu, diros la leganto: vi denove plilarĝigas la koncepton pri arto kaj enkondukas diversajn metiojn.

Kaj tiel decas. Inter la metio kaj la arto forestas abismo[1]).

La bazo de ĉia arto estas la metio, kaj ĉiu metiisto devus esti vera artisto. Pli ol tio: homo povas fari statuon de iu dio kaj tio tamen restos metia produktaĵo, krom tio mizera, pli malutila ol utila; dum aliu povas fari ŝuon, kiu estos vera arteca verkaĵo.

Ĉi-tie ni atingu komprenon.

Belarton oni nomas ofte libera arto, kiel kontraston al la industriaj verkaĵoj, kaj meze oni metas la artecan industrion.

En kio estas la diferenco?

Ĉio, kion faras la homo, por kio li elspezas tempon kaj energion, li faras por la kontentigo de iu bezono. Tutan serion da bezonoj diktas la vivo mem en sia emo al memkonserviĝo kaj evoluo.

La nutraĵo, vestaro, loĝejo, hejtaĵo, armiloj, instrumentoj ktp. estas necesaj por subteni la vivon. Se la homo faras iujn produktojn, ekskluzive konsiderante la subtenon de sia ekzistado — ĉi-tie li estas metiisto, produktanto kaj paroli ĉi tie pri belarto superfluas. Ĉi-tie povas eĉ esti arto, sed ĝi konsistos nur el la lerteco, dank'al kiu dum plej mallonga tempo la homo povas fari multon sen troa laciĝo kaj uzinte minimon da materialoj. La arto estos esprimita nur en la celkonformo de l' faritaj produktoj kaj ties fortikeco. Ti-ĉio estas tute ne libera arto, ne belarto.

Sed jen, ekzemple, homo faras poton por kuiri en ĝi nutraĵon. Li faris la poton, formis, ĉirkaŭbakis ĝin ktp.

Ŝajnas, ke ĉio devus esti finita, sed li — kaj tiel estis eĉ ĉe la plej malkleraj sovaĝuloj aŭ niaj praavoj je la matenruĝo de l' kulturo — ankoraŭ beligas la poton: ekz. ritme (t. e. post difinitaj interspacoj) markas iujn streketojn aŭ makulojn per ia farbo.

La nutraĵo kuirota en la poto, pro tiu ornamo, pli bona ne fariĝos. Sed se la ornamo ne respondus al iu ajn bezono de l' homo, li tion ne farus. Evidente, post la kontentigo de l' unuarangaj bezonoj, ligitaj kun la konservado de l' vivo, aperas iuj novaj.

Jes. La homo vivas ne nur por vivi, sed ankaŭ por ĝui la vivon, por ĝoji.

La naturo — en la procedo de perfektigo de l' animalaj tipoj per la postvivado de l' pli adaptemaj al la vivo, — alligis al ĉiu libera, larĝa demonstro de l' organismo, senton de ĝuo. En la interesoj pri konservo de l' speco kuŝas la maksima forto de difinita organismo, ĝia plej intensiva agado.

La organismo estas tre komplika maŝino, kiu suferas, kiam ĝi tute, aŭ en iu parto, mallaboras aŭ laboras malvigle kaj ne — unutone, malhelpante al la aliaj partoj. Male, ĉiu organo, kiam ĝi vivas tutece, laboras plenpaŝe kaj nome tiel kiel ĝi devas labori, — donas al ni senton de serena plezuro. La homo soifas tiun plezuron, emas pliviglígi sian vivon, fari ĝin plej intensiva. Unutona, malvigleca ekzistado elvokas ĉe li enuon, kiu povas fariĝi egale turmentiga, kiom la malsato.

1) En franca lingvo: artisan = metiisto. (Trad.)

Do, la homo plenumas multe da diversa plusa laboro por plinuancigi sian vivon, plialtigi ĝin, pliriĉigi sian senton, ornami la ĉirkaŭanton. Jen tiu agado de l' homo estas la agado belarta.

Ne ĉiu plikomplikigo kaj plifortigo de l' vivo estas ties plibeligo. Kiam ni devas multe moviĝi, multe koncepti, pensi, ni laciĝas, kaj kiam malmulte — ni enuas. Ĉu mi diru, ke ni devas serĉi la mezon.

— Tio estos ne tute vera. Ne, la homo soifas plejon da impresoj k. travivaĵoj. Neniam estos atingita en ĉi rilato la limo. Kiel do ĉi-tie eviti trolaciĝon?

La afero estas ke da impresoj senordaj la homo povas percepti nur relative tre malmulte, kaj poste venas alarmo, laciĝo, kapturniĝo. Male, en laŭorda, organizata maniero, la homo povas percepti kolosan, ni povas diri, teorie, nelimigeblan kvanton da impresoj.

Kaj jen la tuta belarto reduktiĝas al la havigo al homoj de impresoj laŭorde, tiel ke difinita sumo de konsci-energio, elspezita de l' observanto aŭ de l' aŭskultanto, estis rekompencita per plejo da impresoj.

Ni ekrigardu el pli proksime ĉi tezon kaj kontrolu ĝin, ekz., per la ekzemplo de l' aŭskultaj impresoj: muziko. La mondo de l' sonoj estas tre multnuanca. Sed ĉu oni povas diri ke ju pli da sonoj ni aŭdas; des pli da plezuro ni ĝuas. Evidente ne. Multe da bruo — estas lacige kaj malbele. Sed la muziko efektive laboras ne pri bruoj, sed nur pri tonoj. Vi tuj el knarado, frapoj, susurado, apartigos tion, kio nomiĝas *muzika tono,* kaj el ĉiuj nomitaj aŭskult-impresoj la muzika tono tuj kaj antaŭ ĉio eliminiĝas per la havigata plezuro. Mi efektive tiel nomas ĝin: *pura sono.*

Kio do estas? Estas ke tono, kiel ĉiu sono, estas ritmo, transdonita tra la aer-ondoj, ordo da movoj, puŝoj. Ĉe la bruoj tiuj puŝoj estas malregulaj, kaosaj, sed ĉe la tonoj ili estas regulaj, ili sekvas unuj la aliajn post difinitaj egalaj interspacoj.

Evidente nia nervosistemo pli facile alkutimiĝas al regule sinsekvantaj efikoj, pli facile ilin konceptas, k. tiun facilecon nia konscio perceptas kiel plezuro. Se infano komencos ĉe fortepiano sonigi diversajn notojn, senelekte, el tio nenio rezultos krom lacigo kaj incito. Sed se sonigi la notojn en ajna, sed reguligita ordo, jam riceviĝos iu plezuro. La tasko de l' muzik-artisto estas trovi tiun sinsekvon da tonoj, kiu dum la tuta tempo elvoku nian atenton, estu facile perceptebla, sed per la kosto de tiu facileco havigu ankoraŭ pli da sona enhavo. Tia enhavo kaj reguligita sensekvo da tonoj nomiĝas *melodio.*

La tonoj povas ne nur sekvi unu post alia, sed ankaŭ soni unutempe. Kaj ĉi-tie la rezultoj de tia kuna sonado estas diversaj. Iuj tonoj, atingante samtempe nian orelon, rompas la regulecon unu al alia kaj estas perceptebIaj tiam kiel *disonanco;* aliaj kuniĝas, plifortigas, subtenas, reciproke pliriĉigas unu la alian, kaj nomiĝas *akordo.* La leĝoj, laŭ kiuj oni povas krei tiajn akordojn, agrablajn por la orelo, nomiĝas *leĝoj de l' harmonio.*

Tiamaniere, ĝuste elektante kaj kombinante la sonojn, oni povas doni al la konscio grandegan aŭskult-ŝtofon. La aŭskult-organo tiam laboros regule, laŭ sia strukturo kaj sia naturo, kaj tio havigos al ni plezuron, kiu nomiĝas la formala muzika beleco. Sed ĉi-tie estas ne la tuta muziko. Estas nur ĝia korpo. Ni iru pluen en la fondon de ĝiaj sekretoj.

La homo scias ke sonoj havas signifon. Kaj, antaŭ ĉio, li scias tion laŭ si mem. Li konstante produktas sonojn, vole kaj nevole, kaj per tio esprimas siajn pensojn kaj sentojn. El la sonoj, produktitaj de l' homo, necesas antaŭ ĉio elimini la silabhavajn vortojn. Ili precize esprimas determinitan enhavon kaj ankaŭ, kompreneble, permesas belartan primastradon, kiu koncernas la regionon de *l' poezio.*

Sed la homo ne simple prononcas la vortojn. Li prononcas ilin kun diversaj esprimoj, tiel nomataj *intonacioj.* Kaj ofte tiuj nuraj intonacioj sufiĉas por senvorte esprimi la sentojn. Ĉi-sonoj parolas senpere al nia sento, preterirante la menson, al kiu estas adresata la parolo. Plorego kaj krio, krio de kolero kaj krio de ĝojo, timiĝo, miro — estas plej elokventaj.

Dum malfeliĉo la homo parolas malgajsone, kantante, malaltigante la sonon ĉe la fino, ĝemplorante. Imite je tiuj specifikaĵoj de l' malaltigita spiritstato, kiel ĝi esprimiĝas per sonoj, estas kreataj la t. n. *minoraj tonoj en muziko*. La gaja, vigla homo parolas jen laŭte, jen per interrompataj krioj, jen per ritmeca recitativo; li emas iom plialtigi la tonon, alprenitan komence, sub influo de forto, kiu ĉiuminute alfluas. Sur tio estas bazitaj la *majoraj tonoj*. Sed maleblas nomi ĉiujn nuancojn, per kiuj ludas la homa sonkreado.

Dum liberhoroj, kiujn la homo deziris per io plenigi, kaj kiam neniu neceso diktis al li iun definitan bezonon je laboro, la homo, libere esprimante siajn sentojn, ilin denove travivis kaj transdonis al aliuj, kaj penis tion fari kiel eble plej forte kaj bone, plej interese. Li tiam elektis el ĉiuj sonoj, kiujn li povis elbuŝigi, la plej agrablajn t. e. la purajn tonojn, li kunigis ilin, serĉante melodion kaj harmonion, nature tial ke tiamaniere la sonoj donas pleje da plezuro, — kaj enmetis en ili intonaciojn de malfeliĉo, ĝojo, ĉio, kion li deziris rakonti, kion deziris forte rememori; per kio deziris infekti aliujn. Tiel estiĝis *la kanto*. El la dinamikaj (movaj) reprezentoj de l' batalo, ĉaso, laboro, ankaŭ liberaj, projektitaj por plezuro, naskiĝis *dancoj* kaj *teatro*. Ĉiu arto estas travivaĵo stilizita t. e. homigita, tiel plenumita, kiel tion postulas la strukturo mem de l' percept-organoj kaj movoj, kaj la konscimetodo de l' homo.

Per tio tamen ne nur beliĝas la vivo. La homo, verkante tiamaniere, estas libera foriri tre malproksimen de l' realo, pentrante ne nur tion, kio estis, sed ankaŭ tion, kion la homo deziras, deziratan kaj decan, unuvorte — idealon de l' homo.

Tiel la arto kune kun la formala beleco akiras ne nur psikologian forton (koncentrigitan sent-esprimon), sed ankaŭ sociedukivan, ĉar, pentrante idealojn (aŭ vipante la malbonon per karikaturo) ĝi efikas je la konduto de homoj.

Industrio oni povas nomi ĉian agadon, direktitan al la kontentigo de l' unuaj bezonoj de l' homo, tiuj, sen kies kontentigo oni ne povas ekzisti. Ĉi-tio ankaŭ koncernas, kompreneble, la produktadon de l' produktiloj mem.

Pura arto estos ĉiu agado, celanta ekskluzive, per organizitaj impresoj plialtigi kaj reguligi la vivon de l' konscio, pliriĉigi ĝin. Sed ja ĉiu konsumprodukto povas esti samtempe ankaŭ fonto da ĝojo, havi elegantan formon. La arto plej proksime ĉirkaŭbrakas la vivon, kiam la principoj de l' beleco estas enmetataj en la tutan ĉiutagan homan mastrumadon. Tiel naskiĝis la *art-industrio*.

Antaŭ la homo, nature, staras idealo: rekonstrui la mondon tiel, ke la homoj povu ekzisti en ĉi-medio *plenece*, ekzercante ĉiujn siajn organojn, sian tutan ekzistaĵon, en bela proporcieco kaj tiel, kiel tion postulas la organismo mem ,la cerbo kaj la nervsistemo, portantoj de l' t. n. *spirito*, inkluzive. Tio estas idealo pri mondo *trae* kaj *ĉie* belega, kaj pri homo en ĝi ĉiam feliĉa, neniam sentanta limigon, nek enuon, nek suferon.

La tekniko, kiu emas fari la homon mastro de l' naturo, finfine emas krei kvazaŭ fundamenton por tio; kaj la konstruaĵon mem, krom tio eterne kreskantan kaj evolueman kiel la vivo mem, devas krei la tuthomara arto.

Sed dume ni estas sur la vojo, malfacila krome kaj malĝoja.

La arto ofte degeneras je la distrilo de l' riĉuloj kaj banaliĝas. Ofte la publiko mem, kaj iam ankaŭ la artistoj, estas tiom senmoraligitaj ke ili iras la neĝustajn vojojn kaj organizas impresojn ne arte, sed artifike, tiel ke sana, forta, freŝa homo povas, ilin vidante, nur senti abomenon.

La burĝa sociordo speciale multe malutilis al la arto, deviginte ĝin servi al la merkato.

La socialismo portas kun si liberon por la arto kaj submetas al ĝi grandegajn tutpopolajn taskojn.

Ĉiu centjaro, ĉiu popolo, kaj, tio precipe gravas, ĉiu klaso enportas naturo siajn specifikaĵojn en la arton kiu ia respegulas vivajn animojn en ĉiuj iliaj travivaĵoj; la proletaro, klaso senriĉigita, ne povis ĝis nun iom larĝe partopreni en la art-verkado de l' homaro. Sed ĉirilate oni povas de ĝi multegon atendi.

Elrusigis V. K.

EDUKADO KAJ PEDAGOGIO EN BURĜA KAJ PROLETARIA SOCIOJ

P. BLONSKI

I. EDUKADO

Edukado en la klaseca socio estas daŭra influado sur la evoluadon de la maturiĝanta homo, organizita en la interesoj de l' ekspluatantoj kun celo adapti tiun homon al lia estonta klasa stato — kiel ekspluatanto aŭ kiel ekspluatata laborforto. En la klaseca socio ekzistas almenaŭ du sistemoj de l' edukado — por la ekspluatantoj kaj por la ekspluatatoj. Tiuj ĉi sistemoj estas la nelabora kaj labora edukadoj. Esenco de l'edukado estas difinata per ekonomia kaj politika strukturo de certa socio en certa epoko. La nelabora edukado de ekspluatanto en la epoko de feŭdalismo estas milita edukado de militisto-terposedanto, en la epoko de komerca kapitalo — retorika edukado de plutokrato-politikisto kaj en la epoko de industria kapitalo — reala (nature-science-historia) edukado de kondandantoj de l' industria socio. La labora edukado de ekspluatatoj en la sklavposeda socio estas edukado de bridita sklavo, kaj en la pli malfrua kaj moderna socio — edukado de kredanta laborulo kaj de laboranta "civitano-patrioto".

"La celo, kiun metas la burĝa ŝtato al la lernejo, estas servi kiel rimedo por klasestreco de la burĝaro. Kiun celon metas al si la proletaria ŝtato? Trudiĝas tia respondo: servi kiel rimedo por klasestreco de la proletariaro. Tia respondo trudiĝas, ĉar estas malĝuste metita la demando: "proletaria ŝtato" estas termino, kiun oni trouzas. La proletariaro prenas la potencon ne por meti la klason laboristan en privilegia stato, sed por ekstermi ĉian klasestrecon, ekstermi ĉian ŝtaton.[1]) Tial do la termino "proletaria ŝtato" estas termino erara, konfuziga. Kaj oni devas meti la problemon ne tiel. Oni devas demandi: kiujn celojn metas antaŭ la lernejo la klaso laborista? Tiu ĉi celo iras laŭ la linio de la komunaj celoj de la klaso laborista. La celo estas en edukado de l' generacio, kiu povus efektivigi la celojn de la klaso laborista. Kia ĝi por tio devas esti? Trasorbita per kolektivisma instinktaro; klare komprenanta, por kio batalas la nuntempa antaŭiranta klaso; komprenanta, ke idealoj de la klaso laborista kuŝas sur la vojo de la socia evoluado, ke ili tial estas realaj, efektivigeblaj. La juna generacio devas klare vidi la vojojn, kiuj kondukas al realigo de la celoj de l' klaso laborista, scipovi iradon sur tiuj vojoj. Kiel la burĝaro, tiel ankaŭ la klaso laborista metas al la lernejo certajn celojn, sed la burĝaro traktas la lernejon, kiel rimedon por klasestreco, dum la proletariaro traktas la lernejon, kiel rimedon por eduki generacion, kiu kapablos finigi la klasestrecon" (Krupskaja). "Se la burĝa edukado estis preparanta el proletariaj infanoj dungitan sklavaron kaj militilon politike fidelan, — ni el niaj infanoj devas prepari konstruantojn de la nova vivo, batalantojn por la socialisma, por la proletaria idealaro" (Ŝulgin). "La plej jĉefa, kio devas diferencigi la socialisman lernejon de la nuntempa, estas tio, ke por ĝi socialisma, por la proletaria idealaro„„ (Ŝulgin). „„La plej ĉefa, kio devas subpremi lian individuecon, sed nur helpi al ĝi formiĝi... Sed, helpante al la individueco formiĝi, la lernejo devas prepari la lernanton, ke li scipovu apliki tiun individuecon en komunutila laboro. Kaj tial dua atribuaĵo de la socialisma lernejo devas esti vasta evoluigo de l' infana produktiva laboro. Kaj tia lernejo estos preparanta la homojn ĉiurilate preparitajn al la laborado, scipovantajn preni ĉian laboron, adaptiĝi al ĉia maŝino, al ĉiaj kondiĉoj de produktado. Kaj tio estos homoj, egale kapablaj ankaŭ al tiu inteligenta laboro, kiu estis ĝis nun monopolaĵo de la speciala privilegia klastavolo kaj kiun devas scipovi la loĝantaro mem, por liberiĝi el dependado de la burokratio kaj por esti mem mastro de la vivo" (Krupskaja). "Nun ĉiuj teroj, fabrikoj kaj uzinoj estas donitaj al la laboristoj kaj kamparanoj. La

[1]) Vidu Lenin — "La ŝtato kaj la revolucio".

laboristoj nun estas vokitaj ne nur por stari ĉe la stablo kaj por iri post la plugilo, sed ankaŭ por administri bienojn kaj produktilojn — fabrikojn kaj uzinojn. Kaj estas tute natura nun la aspirado al la scienco, vekiĝinta inter la laboristaro. La laboristoj aspiras al la scienco kaj la lernejo, kaj nia tasko estas nun doni al ili tiun ĉi sciencon kaj lernejon. Iuj nin riproĉas, ke ni la lernejon faras klaseca. Sed la lernejo ja estis tia dum la tuta tempo de sia ekzistado ... Ni parolas, ke ankaŭ nia lernejo estos klaseca, sed akcelanta la interesojn nur de la laboraj loĝantar-tavoloj. Necesas apliki ĉiujn fortojn, energion kaj sciojn por laŭeble plej rapide altigi la konstruaĵon de nia estonta laborlernejo, kiu nur sola povos forbari nin en estonto je ĉiaj mond-puŝiĝoj kaj buĉadoj similaj al tiu, kiu daŭras jam la 5-an jaron“ (Lenin).

Do, en la socio, kie la potenco estas en manoj de la klaso laborista, la edukado estas daŭra influado sur evoluadon de la maturiĝanta homo, organizita en la interesoj de la klaso laborista kun celo ellabori ĉiurilate progresintajn homojn, povantajn finiĝi ĉian klasestrecon kaj ekspluatadon. Tia ĉiurilata evoluigo estas atingebla per kunigo de la produktiva laboro kun la fizika progreso, mensa klerigo kaj politeknika edukado kaj havas premise, unuflanke, grandan maŝin-produktadon, kiu teknike ekstermas la malnovan sistemon de la labor-distribuo, kaj, aliflanke, la revolucian laboristan, kiu ekstermas la ekonomian kaj politikan potencon de la ekspluatantoj. La revolucio laborista finigas dualismon de l' edukado je ekspluatantoj kaj ekspluatatoj kaj kreas unuecan sistemon de l' edukado, en kiu la laboredukado harmoniiĝas kun tiu fizika kaj mensa progreso, kiu ĝis nun estis privilegio nur de la ekspluatantaj klasoj. “Ne eblas prezenti al si la idealon de la socio estonta sen kunigo de l' instruado kun produktiva laboro de la juna generacio: nek instruado, nek klerigo sen produktiva laboro, nek produktiva laboro sen paralela instruado kaj klerigo povus esti metitaj sur tiun altecon, kiu estas postulata de la moderna teknik-nivelo kaj stato de la scienca scio“ (Lenin). “La loĝantaro estas interesita, ke la komenca, meza kaj supera lernejoj havu komunan celon: edukadon de ĉiurilate progresintaj homoj kun konsciaj kaj organizitaj instinktoj, havantaj novan trapensitan mondkoncepton, klare komprenantaj ĉion, kio okazas ĉirkaŭ ili en la naturo kaj socia vivo; edukadon de homoj preparitaj teorie kaj praktike al ĉiaspeca laboro kiel fizika, tiel ankaŭ mensa, scipovantaj konstrui racian, esencoplenan, belan kaj ĝojan socian vivon“ (Krupskaja).

II. PEDAGOGIO

Ĉia scienco estas tiom scienco, kiom ĝi studas faktojn, konstituante inter ili tiujn aŭ aliajn dependaĵojn. La pedagogio, kiel scienco, studas faktojn de l' edukado en ili dependeco de tiuj aŭ aliaj kaŭzoj. Tiel, ekzemple, la problemo pri ĉu devas ekzisti punoj aŭ ne — ne estas problemo de scienca esplorado. La pedagogio, kiel scienco, metas la problemon alimaniere: kiaj punoj kaj kial ekzistas? Rezulte estas ricevata respondo: tiaj punoj ĉe tiaj cirkonstancoj ekzistas kaj povas ne ekzisti nur ĉe malapero de tiaj cirkonstancoj. La edukado estas kreata ne laŭ volo de aparta homo, kia ajn genia li estu; la edukado estas funkcio de certaj ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj, kaj ĉe certaj cirkonstancoj ekzistas kaj povas ekzisti nur certa edukado. En la cirkonstancoj de l' ekspluata socio la fundamenta tasko de l' pedagogio, kiel scienco, estas senmaskigi la fakte ekzistantan edukadon kaj montri ĝian dependecon de la tuta aranĝo de la socio burĝa.

Tute alia estas tasko de l' pedagogio en la socio, kie potenco estas en manoj de la klaso laborista. En tiu ĉi socio, kaj nur en ĝi sola, la edukado servas al la celoj de l' laborantaj amasoj kaj konsideras ĉiurilatan kaj plenan progresigon de la infanoj de l' laboristaj amasoj por ke ili povu finigi ĉian ekspluatadon kaj ĉian klasestrecon. Konsekvence la pedagogio estas scienco por ĉiurilata kaj plena evoluigo de la maturiĝanta homo en fizika, soci-labora kaj intelekta rilatoj. La pedagogio estas scienco pri progresigo de potencaj ĉiurilate (fizike, teknike, socie kaj intelekte) infanoj

de la laborantaj amasoj. Sed kiel tia scienco la pedagogio ne povas ne bazi sin sur tiu scienco, kiu studas la faktan evoluon de la maturiĝanta homo depende de tiuj aŭ aliaj kondiĉoj, t. e. sur pedologio. La pedologio, studanta evoluon de la homo en infanaĝo, kaj la pedagogio, studanta la faktorojn favorajn al tiu evoluo, pli kaj pli alproksimiĝas unu kun la alia. Rilato inter tiuj ĉi du sciencoj estas samtia, kia estas inter zoologio kaj animal-kulturado, botanio kaj vegetal-kulturado. Kiel animal-kulturisto en sia agado sin bazas sur zoologio, tiel ankaŭ pedagogo devas apogi sin sur pedologio. Nur sciante, en kio konsistas evoluado de l' infano, oni povas solvi la problemon, kiel krei ĝian plenecon kaj ĉiurilatecon.

Verdire, embrie la pedagogio, kiel scienco, ekzistas ankaŭ en kadroj de la burĝa socio. Penante garantii al la infanoj de l' kapitalistoj sufiĉan gradon da mensa evoluo, la pedagogio de l' burĝa socio ne povis ne meti la problemon pri esenco kaj leĝoj de mensevoluo ĉe la infanoj. Ankaŭ, zorgante pri ilia fizika edukado, li ne povis ne peni klarigi esencon kaj leĝojn de fizikevoluo de l' infanoj. Fine, li ne povis ne labori super pedologio de l' laboro, kiomgrade antaŭ li staris la problemo pri laborpedagogio. Tiusence ni ankaŭ en la burĝa pedagogio trovos multan valoran sciencmaterialon, kiu devas esti utiligita de ni. Multaj specialaj pedagogiaj problemoj ankaŭ en la burĝa pedagogio estis tralaborita sufiĉe fundamente. Granda parto da tiuj brikoj, el kiuj devas esti konstruita la pedagogio, kiel scienco, jam estas havata, kaj ni malpli ol ĉion alian devas ilin ignori. Sed tamen ne la burĝaro devas konstrui la pedagogion, kiel sciencan sistemon. Multaj unuagrade gravaj kaŭzoj faras tion neebla por ĝi. La burĝa pedagogio kutime traktas la pedagogian procedon, kiel izolitan de la cetera ekonomia kaj politika konjunkturo. Matematikesprime, ĝi traktas tiun ĉi konjunkturon kiel grandon kontinuan, sed ne variantan, kaj per tio mem ĝi senigas sin de la ebleco klarigi laŭleĝecon kaj laŭkaŭzajn ligojn de la pedagogia procedo. La lasta en ĝiaj pedagogioj aperas ekster ligo kun aliaj flankoj de la socia vivo, forŝirite de la ĝenerala historia situacio.

Poste, eĉ en la limoj de la pedagogia procedo mem la burĝa pedagogio, ne aspirante fakte la taskojn pri ĉiurilata evoluigo de la homo, per tio ĉi liveras neplenan, unuflankan analizon pri traktata de ĝi pedagogia problemo. La pedagogia procedo, kiel tuteca kaj interligita procedo, ordinare disfalas je kelkaj specialaj malgrandaj pedagogiaj problemoj, kaj evidentigo de interrilato kaj ligo inter apartaj flankoj en disvolviĝo de l' infano estas malplej tralaborita en la burĝa pedagogio problemo. Sufiĉe detale analizante la problemon pri progreso de tiuj aŭ aliaj specialaj flankoj en disvolviĝo de l' infano, ĝi malbone orientiĝas en la problemoj pri interligiteco de ĉi tiu evoluo. Aforism-esprime oni povas diri, ke la burĝa pedagogio bone, al la scienca vidpunkto, tralaboris diversajn apartajn ĉapitrojn pri la pedagogio, sed ne la pedagogion kiel tutecan sciencan sistemon.

Fine, la burĝa pedagogio, malpleje konsiderante la problemon pri ĉiurilata progresigo de l' amasoj, sian ĉefan atenton kuncentrigis sur aparta infano. Plej peneme ĝi studis ne la infanamason, sed infanon, kaj kutime eĉ ekster ties socia stato. Tamen nur studado de amas-fenomenoj faciligas eblecon eltrovi ilian laŭleĝecon; sed dum studado de apartaj fenomenoj grandan rolon ludas la okazo. Tiu ĉi cirkonstanco ankaŭ estis malhelpanta al la burĝa pedagogio atingi plenan sciencecon.

Certe, apartaj reprezentantoj de la burĝa pedagogio estis tuŝantaj ankaŭ tiujn ĉi problemojn, sed ni parolas tie ĉi pri ĝenerala tendenco de la tuta burĝa pedagogio. Tiu ĉi tendenco estas kondiĉata de l' esenco mem de la burĝaro, kiel klaso de l' ekspluatantoj, ne zorganta pri tasko doni ĉiurilatan progreseblon al la infanoj de la labor-amasoj kaj tial devigata montri la procedon pedagogian kiel abstraktan unuflankan procedon, ekster ĝiaj diversflankaj interligoj kaj laŭleĝecoj, samtempe maskante kaj idealigante diversajn esencajn flankojn de tiu ĉi procedo. Nur en tiu socio, kies esenco estas progresigo de l' potenca klaso laborista, eblas la pedagogio, kiel scienco.

El la rusa tradukis *Vol. Duno.*

Ni plene subtenas la inviton de la k-do kaj proponas, ke samtempe k-doj pridiskutu ankaŭ la rakontojn de V. Kuzmiĉ (Du el grandioza mondpatrio) kaj de L. Ivn (Profesoro Krajon). Ĉiuj tri rakontoj estas originale verkitaj de niaj SAT-anoj, kaj la unuaj du tuŝas apartajn SAT-problemojn.

En la procedo de tiu diskutado en lokaj SAT-grupoj povas evidentiĝi k-doj, pli vigle interesiĝantaj pri nia revuo kaj emaj al literatura laboro. Ni estas certaj ke dum la diskutado mem tiuj ĉi k-doj formos por plua samdirekta laboro "rondetojn de Sennacieca Revuo", kiuj daŭre kontaktos kun la redakcio kaj helpos per siaj kritikoj, konsiloj kaj kunlaboro al progresado de nia revuo. La rondetoj mem ellaboru programon de sia laboro. Por helpi al tio, en sekvantaj red. anguloj ni publikigos provan skizon de tia laborprogramo.

La propono de k-do Fade, cetere naskita de la SAT-vivo mem, helpas al ni trovi la vojon por plua vigligo de nia revuo. La amikoj de "Sennacieca Revuo" certe ne preterlasos provi tiun vojon!

Ni ne volas fini la hodiaŭan angulon, ne rememoriginte al niaj kunlaborantoj kaj al ĉiuj SAT-anoj pri la neceso sendi taŭgan (precipe mallongan) materialon por nia maja numero. *La Redakcio.*

PRESEJO:
UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT
LEIPZIG (GERMANIO)